



NI TRANSLOKIĜIS AL NODO50

Nia paĝaro nun troviĝas en la alternativa retservilo NODO50, unu el la plej gravaj virtualaj renkontiĝejoj de la alternativaj movadoj.

Kio estas NODO50?: Laŭ sia propra difino, “ĝi estas aŭtonoma projekto de telematika kontraŭinformado celanta la socialajn movadojn, ĝi estas sendependa asembleo kiu provizas informadikajn kaj komunikajn servojn al politike maldekstraj homoj, grupoj kaj organizoj, ĝi estas servilo de Interreto kie koincidas sendependaj kaj alternativaj voĉoj apartenantaj al vasta politika spektro; ĝi estas renkontejo, disvastigejo kaj kontraŭinformejo por la senvoĉuloj, disidentoj, renversuloj, utopiistoj kaj malkontentuloj... nenio pli kaj nenio malpli”.

Kiaj organizoj troviĝas en NODO50? Povas aliĝi al NODO50 kaj estas reprezentata en ĝi granda spektro de la politika kaj sociala maldekstro, de la movadoj de transformado kaj kontestado: de la ekologiismo ĝis la feminismo, de la klasa sindikatismo ĝis la liberaj radioj kaj la internacia solidareco, de la teologio de la liberiĝo al la socialaj renkontiĝejoj, de la kunlaboro por la disvolviĝo ĝis la familianoj de la malaperintoj, de la aktivula kontraŭkapitalismo ĝis la demokratiigo de la edukado, de teoriaj grupoj ĝis kolektivoj de rekta agado, de la besta liberiĝo ĝis la luktoj kontraŭ la tutmondigo.

Tie estas nia loko, kaj tien ni alvenis. Do, vi jam povas nin viziti en la nova –simpla– adreso: <http://www.nodo50.org/esperanto>.

Por ricevi viajn leterojn, vi povas uzi niajn novajn retajn adresojn: esperanto@nodo50.org (por informaj celoj) kaj sateh@nodo50.org.

Tamen, dum iom da tempo plu validos la antaŭa adreso, <http://satenhispanio.eresmas.com>, kiu jam fariĝis sufiĉe konata, kaj al kiu ligas paĝoj de tre diversaj homoj kaj asocioj.

LA KONSTITUCIA REFERENDUMO

“La hispana registaro anoncis la okazigon de referendumo pri la Projekto de Eŭropa Konstitucio februarie 2005. Ĝi estas okazonta kaj tamen la informo pri ĝi estas malabunda. En ĝia definitiva versio, akceptita la pasintan 18an de junio, la Traktato aperas kiel ilo kiu ege malfaciligas la eblon realigi, kaj en la eŭropa medio kaj en la membroŝtata medio, ekonomiajn kaj socialajn politikojn alternativajn al tiuj realigitaj ĝis nun. Eĉ se ili havus la subtenon de la balotantoj. Do, tio aprobotas aŭ malaprobota estas gravega kaj tuŝos la ĉiutagan vivon de milionoj da homoj en la kontinento kaj en la mondo.”

Tiel komenciĝas artikolo “La Projekto de Eŭropa Konstitucio referendume: dek kialoj por diri «ne»”, de Jaime Pastor, Xavier Pedrol kaj Gerardo Pisarello, kiun ni publikigis en nia retpaĝaro. Ĝi apartenas al serio de eseoj pri la sama afero, plejparte kritikaj, parto de komuna projekto kun nia referenca asocio SAT, kiun vi povas trovi ankaŭ en la nova adreso de SAT-Kulturo:

SAT-Kulturo: <http://esperanto64.free.fr/>

Kun tiu ĉi Informilo, ni aldonas alian tekston pri la sama afero, en papera formato: “La eŭropa konstitucio kaj la maldekstro”.

KOMUNIKO DE SAT-en-Hispanio PRI LA FERMO DE RADIO BRONKA

El la fino de la monato decembro estis interrompita la elsendo de la alternativa radio, Radio Bronka, el Barcelono, kiu posedas sekcion en Esperanto, aŭskulteblan ankaŭ en la Reto. La fermo estis okazigita pro la traslokigo de la frekvenco de la oficiala Radio 5. SATeH montris sian solidaron al Radio Bronka, kaj sendis mesaĝon en la hispana kaj la kataluna lingvoj al la kataluna registaro, petante ke oni trovu solvon por tiu stacio, kiu plenumas gravan rolon informan kaj kulturalan. La komunikado estas legebla ankaŭ en Esperanto:

“Antaŭ la ĉeso de la elsendado de Radio Bronka, pro la ekutiligado de la sama frekvenco fare de la oficiala stacio Radio 5, la Asocio SAT-en-Hispanio (SATeH) deziras manifesti sian ĉagrenon kaj sian deziron ke estu trovata solvo permesanta la dissendon de la informaĵoj kiujn tiu ĉi alternativa radio produktadis ĝis tiu ĉi momento.

Krom sia grava informa laboro en aliaj temoj, Radio Bronka estas unu el la malmultaj radioj de la hispana ŝtato produktinta ĉiutagan programon en Esperanto, kio taŭgis por diskonigi tiun ĉi lingvon inter aŭskultantoj ne nur el Barcelona kaj ĉirkaŭaĵoj, sed ankaŭ el la tuta mondo, danke al sia resendado pere de Interreto.

La kulturalan servon havigitan de Radio Bronka, konstatita de nia asocio, oni devas konsideri por trovi adekvatan solvon kiu ne iru kontraŭ la esprimlibereco, ĉar la informoj elsenditaj de Radio Bronka ne estas facile troveblaj en aliaj konvenciaj stacioj.

Ni deziras esprimi al la kataluna registaro (Ĝenerala Direkcio de Aŭdvidaj Medioj) nian deziron ke estu trovata adekvata solvo permesanta la pluigon de la elsendoj de la radio nun silentigita.

Madrido, je la 9 de januaro de 2005.”

MONDA SOCIA FORUMO

Dum la lasta semajno de januaro okazis en Porto Alegre, Brazilo, la kvina Monda Socia Forumo.

Pri la Sociaj Forumoj, kiuj estiĝis kiel alternativa renkontiĝejo de sociaj movadoj al la konferencoj de la potenculoj arigantaj en Davos (Svisio), ni jam rakontis en pasinta eldono de nia Informilo, precipe okaze de la partopreno de SAT en la Eŭropa versio. Ĉifoje la partopreno de la esperantistoj estis pli bunta kaj pli diversa. Ne mirinde. Interalie pro tio, ke la esperanto-movado ege progresas en tiu mond-regiono.



NIAJ AGADOJ



Nek milito inter popoloj, nek paco inter klasoj

Dum la longa semajfino komence de decembro (4a, 5a kaj 6a) okazis en Granada la 22a kongreso de ILA (Internacia Laborista Asocio), kiu kunigas anarkisindikatismajn organizojn de multaj landoj. Ĉifoje kunvenis 50 delegitoj el 14 naciaj organizoj alvenitaj el la tuta Eŭropo kaj Latinameriko. Krome ĉeestis centoj da observantoj.

Kiel en ĉiu internacia kunveno la lingva problemo evidentiĝas kaj kvankam la oficialaj lingvoj de la kongreso estis kaj la hispana kaj la angla, multaj el la ĉeestantoj interesiĝis pri Esperanto kaj fakte sufiĉe alproksimiĝis al budo starigita de la Kontaktejo pri Esperanto de la CNT kaj SATeH, kie ni interparolis kun la interesatoj, disdonis flugfoliojn kaj diversan materialon kaj vendis librojn. Ni povis kontakti malnovajn lernintojn kiuj forlasis la studadon kaj promesis daurigi ĝin post kiam ili konstatis, ke sufiĉe da homoj uzas Esperanton kaj en progresemaĵoj kaj en liberecanaj organizoj.

Oni konstatas, ke en tiuj liberecanaj medioj la ideo pri Esperanto sufiĉe pretervivis.

» Inter la 17a kaj la 19a de septembro 2004, SAT-en-Hispanio partoprenis denove la Feston de la Komunista Partio de Hispanio, kie pasintjare ni jam disponis je propra budo, kun materialo pri Esperanto kaj pri la esperantista laborista movado. La elmontraj de malfido kaj skeptikismo, ĝis nun kutimaj, ŝajnas lasi lokon al aliaj montrantaj veran intereson, kaj oni konstatas ke granda parto de la publiko agnoskas la eblecojn proponitajn de Esperanto en la serĉo de pli justa socio.

» Dum la venontaj tagoj 4a, 5a kaj 6a de marto ĉijara okazos en Mataró, en gastejo Can Soleret, renkontiĝo de progresemaĵoj esperantistoj, profitante la okazigon de kurso en la sidejo de loka CNT. Se vi deziras partopreni, skribu al ni, kaj ni informos pri la detaloj de aliĝo kaj la programo.

INDYMEDIA EN ESPERANTO

Indymedia Barcelona enkondukas esperanton: Kataluna Esperanto-Asocio sukcesis la enkondukon de esperanto en la novaĵ-servejon *Indymedia Barcelona*. La esperanta versio estas trovebla sub: <http://barcelona.indymedia.org/?lang=eo>

Indymedia estas granda reto prizorgata de grupoj en la tuta mondo kaj organizata per retlistoj kaj asembleoj. La informcentro estas libera kaj kolektiva loko, kiu permesas, ke esprimu sin individuoj, socialaj movadoj kaj ĉiaj organizoj sen ebleco aliri la amaskomunikilojn. Sur tiu bazo, la asembleo de Indymedia Barcelona decidis prezenti esperanton kiel novan lingvan eblecon por legi la ĉefartikolojn. Per esperanto ĝi “celas kontribui al pli justa mondo, en kiu neniu, pro naskiĝo aŭ ekonomia nivelo, havu pli da eblecoj scipovi la superregantajn lingvojn; t.e., ĝi celas eviti diskriminacion pro lingvaj kialoj”. Per tio esperanto prezentiĝas samnivele apud la kataluna, la hispana kaj la angla.

KAJ ANKAŬ VIKIPEDIO

En tiu ĉi grandioza projekto de elektronika enciklopedio, en plej diversaj lingvoj, Esperanto havas elstaran rolon. Kun pli ol 20.000 artikoloj nuntempe, kaj vigla disvolviĝo, la esperanta sekcio estas unu el la plej gravaj, pro la amplekso de la tekstoj.

Diversaj membroj de nia organizaĵo partoprenis en la redaktado de artikoloj, interalie pri la esperantista laborista movado. Vi povas ĝin viziti en: <http://eo.wikipedia.org>.

NIAJ LIBROJ

Plu funkcias nia Libro-Servo. Kvankam ĝia ĉefa celo estas la distribuado de tekstoj (libroj kaj broŝuroj) eldonitaj de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), ni metas je via dispono aliajn tekstojn de la literaturo hispana kaj internacia.

Donkiĥoto parolas Esperanton

Eble nun estas la momento reveni al unu el la plej karaj juveloj de la tutmonda literaturo, la aventuroj de *la inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha*, en la esperanta traduko, kiun ni povas peri al ĉiuj interesitoj.

Skribu al ni, kaj ni sendos la katalogon de libroj, kun prezoj kaj sendokondiĉoj.



MUZIK-SERVO

Nia asocio de nun plifaciligas al hispanlingvanoj la aĉetadon de muziko en Esperanto. SATeH povas peri la diskojn de la ĉefa distribuejo de muziko en Esperanto, *Vinilkosmo*. Tre kompleta katalogo, kun la priskribo en hispana lingvo, la prezoj kaj la ebleco aŭskulti specimenojn de la disko, estas nun trovebla en la specifa elektronika adreso:

<http://personal.auna.com/mmmoral/indice.discos.1.htm>

Se vi deziras aĉeti muzikon, skribu al ni, kaj ni havigos al vi la deziratajn diskojn.

Jen ekzemplo de disko trovebla en nia katalogo, kaj de ĝia priskribo en la hispana lingvo:



KAJ TIEL PLU SOJLE DE LA KLARA TEMP'

Primer CD del conjunto de Barcelona *Kaj Tiel Plu*, grupo dedicado a la música popular catalana. El repertorio incluye canciones de la Edad Media y de trovadores de Occitania, Cataluña y Castilla. También aparecen cantos sefardíes y de la guerra civil española.

LA KONGRESO DE SAT

En sia E-historio Zagreb la unuan fojon gastigas SAT kongreson.
La 78a SAT Kongreso okazos de la 2a ĝis la 9a de julio en Zagreb.
Tuj sekvos la postkongreso ĉe la maro kun ekskursoj tra istria duoninsulo.
Unua aliĝperiodo: 28a de februaro 2005

Pli da informoj: sat_hr@yahoo.com
http://www.geocities.com/sat_hr/kongres2005.html

Por kontakti kun ni:

SAT-en-Hispanio (SATeH)

Poŝtokesto (Apartado de correos) 8537, ES-28080-Madrid
sateh@nodo50.org

<http://www.nodo50.org/esperanto>